



aktuala

37-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Eldonisto kaj redaktisto: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; **Novaj redaktistoj ek de Januaro 2012: Samy kaj Laurence Loisse, 95 Tir aux Pigeons 1150 Bruselo, laur1150 @ yahoo.fr**; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metro MAALBEEK (tie nek poŝtekesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belgio, 10 eŭroj jare, konto BE64 0000 1230 4852, BIC: BPOTBEB1; Eltiro 150 ekzempleroj. Informoj: www.esperantobruselo.org; aktuala.retejo.net; br11.leadhoster.com; ebg.skynetblogs.be; uea.org; paulo.retejo.net; barelo.blogspot.com; esperanto.net; esperanto.be; lernu.net; liberfolio.org; eo.eventeo.net Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktisto aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Zamenhofa festo de EBG
- Paĝo 3 - Laŭrenco kaj Samy Loisse, novaj redaktistoj de Aktuala
- Paĝo 4 - KrucEnigmoj, ŝercoj kaj tradukaĵoj de Lucien Michaux
- Paĝo 8 - Sevila Jubileo kaj Andaluzia Kongreso
- Paĝo 10 - Internacia E-Semajno en Malgrat de Mar
- Paĝo 12 - Etsuo Miyoshi demandas: Ĉu ni mortu aŭ prosperu?
- Paĝo 12 - Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo
- Paĝo 13 - Poloj en Bruselo kun Halina Komar
- Paĝo 15 - Jarasembleo de E.B.G., E-Café kaj Zam-festoj
- Paĝo 16 - Poemaro de Alberto Garcia Orive kaj Kálmán Kalocsay
- Paĝo 18 - Solvoj de la KrucEnigmoj
- Paĝo 19 - Vortara paĝo kun desegnaĵoj

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Januaro 2012

- 4 Semajna Kunveno
- 11 Semajna Kunveno
- 18 Semajna Kunveno
- 25 Bernard-Regis Larue pri Galaksioj

Sabaton 17/12/2011 12:00 – 20:00

Placo Cardinal Mercier 10
1090 Jette



Dirajno : www.ness.be

- 12:00 Bufedo 16 € / 6 €
- 14:00 Skeĉoj, kantoj, tombolo, atelieroj, iniciado al Esperanto, koncerteto J-P Poulin Inf. 8 € / 3 €
- 18:00 Koncerto folka

Informoj: 0478 38 29 81
www.esperantobruselo.org

Kajto



Kun la subteno de la komunumo de Jette

Aliĝo ĝis la 10/12/2011




LAŬRENÇO KAJ SAMY LOISSE



Novaj redaktistoj de nia bulteno "Aktuala Esperanto" ek de la venonta numero

KRUCENIGMOJ

Dum la unuaj tagoj de mondmilito ricevis komandanto de kolonia garnizono, tute perdita en afrika dezerto, telegramon de sia superulo : "Ekplodis milito, arestu ĉiujn malamikajn eksterlandanojn en via distrikto". Dum tri tagoj, kamelrajdis la komandanto kun siaj soldatoj tra la regiono kaj poste sendis respondon : "Arestitaj sep germanoj, tri belgoj, du francoj, kvar italoj, unu aŭstro kaj unu usonano." Kaj demandis: "-----".
Kion li ekzakte demandis, tion eltrovu per plenigo de la krucenigmo !



Horizontale :

- A) Kaŝdemando.
B) Penso. / Solulo. / Hasta. / Ŝtonego.
C) Malebria. / Ĉapo de papo. / Malbruta. / Senindulga severec'.
Ĉ) Marŝi. / Sama. / Foje. / Rulpuŝi. / Kuk.
D) Id'. / Nek via, nek ilia. / Sufokiĝi en akvo. / Instrumento. / Tabelvorto. / Prepozicio.
E) Amora. / Natura akvobaseno. / Pura muzika sono. / Islama nabel'.
F) Ejo. / Solvi. / Literatura gazeto. / Malkuraĝi.
G) Spirite prezenti. / Grimaci. / Kanalforma spaco en homa korpo. / Tio kio estas aŭdebla.
Ĝ) Kapvesto. / Sudamerika monunuoj. / Hebreism'. / Artikolo.
H) Membro. / Religia bildo. / Preme malhela. / Ricevaj'.

Vertikale :

- 1) Liptuŝi. / Contenta.
2) Esti flarebla. / Legaj'.
3) Akva vaporo en atmosfero. / Korpoparto.
4) Montara rivero. / Paro.
5) Respondi. / Poemet' pri kampara vivo.
6) Ne natura. / Gajno.
7) Mal-akra. / Skurĝo.
8) Tabelvorto. / Klaŭn'.
9) Tre malofta metalo (Y). / Kortbirdo.
10) Prabovo. / Malsano.
11) Tripla malgrandul'. / Persona pronomo. / Posteno.
12) Batalgaso. / Esti surprizita (rad.).
13) Molukso. / Gas' por reklamiloj.
14) Infana. / Malproksima.
15) Konifera arbo. / Stepa bird'.

- 16) Eksciti. / Atmosfero.
 17) Vesto de antikvaj romianoj. / Korinklini. / Kemia simbolo de samario.
 18) Harmonii. / Maldura.
 19) Destin'. / Pikilhava mamul'

Eva Jelinkova, Ĉe Monato (majo 89)
 laŭ Lucien Michaux

MAGIAJ KVADRATOJ

	1	2	3	4	5
1					
2					
3					
4					
5					

- 1) Infan' de hejma besto.
- 2) Kiel estro de monaĥejo.
- 3) Fum-material'.
- 4) Sudeŭropano.
- 5) Ornam'.

	1	2	3	4	5	6
1						
2						
3						
4						
5						
6						

- 1) Rilata al konata revuo.
- 2) Usona ŝtat'.
- 3) Aŭdaca.
- 4) Politike varbas.
- 5) Ĝardena frukto.
- 6) Akvobirdoj.

Helmut Rössler laŭ Lucien Michaux

5

MENSA ENIGMO

La nombroj estas sumoj de liniaj aŭ kolumnaj signoj. Eltrovu kiun adicisumon havas la plej supra vico.

♣	♠	♠	♠	?
♦	♥	♦	♥	536
♥	♥	♥	♦	538
♦	♣	♣	♣	529
533	549	547	547	

LUCIEN MICHAUX TRADUKIS

Doktoro, demandas la zorgema edzino, ĉu mia edzo ankoraŭ povas amori nun kiam li suferis infarkton? Certe sinjorino, respondas la kuracisto sed nur kun vi ĉar li tute ne plu devas ekscitiĝi...

Unua lernoĵara tago en Bruselo..., la gimnaziestro registras la ĉeestantojn.
 -"Mustafa El Ehzeri" -"ĉi tie"
 -"Ahmed El Kabul" -"estas mi"
 -"Kadir Sel Ohlmi" -"jes"
 -"Mohamed Endrha" -"jes"
 -"Ala In Ben Oit" Klaso silentas.
 -"Ala In Ben Oit" Silento restas.
 - Lastfoje: "Ala In Ben Oit".
 Subite iu knabo en la lasta vico leviĝas kaj diras al direktoro:
 - Mi kredas ke estas mi, sed oni prononcas: Alain Benoit.

Tibeta monaĥo paŝas sur frosta montvojo kaj aŭdas mallaŭtan pepadon. Li ĉirkaŭrigardas kaj vidas piede de heĝo tre malgrandan paseron duone frostomortintan. Li prenas ĝin kaj revarmigas ĝin en siaj manoj.
 "Kion fari, li sin demandas? Se mi tenos ĝin kun mi, ĝi malpurigos mian robon, kaj en la monaĥejo la kato ĝin

6

frandos. Se mi lasos ĝin ĉi tie, ĝi frostmortos."
 Subite, ekvenas ideo: por ŝirmi ĝin kontraŭ frosto, li metas la paseridon en fumantan fekaĵon de sankta bovino kaj daŭrigas sian vojon kun paco en l'animo.

La pasereto revarmiĝas kaj plenvoĉe ekkantas sian ĝojon ankoraŭ vivi. Vulpo preterpasanta aŭdas la bovan flanon kantadi. Scivoligita, ĝi proksimiĝas, trovas nian paseron kaj formanĝas ĝin.

Tri moralinstruoj el ĉi tiu rakonto:

- 1) Kiu pelas vin en merdon, ne nepre volas fari malbonon al vi.
- 2) Kiu eltiras vin el merdo, ne nepre volas fari bonon al vi.
- 3) Kiam vi estas en merdo, fermu vian faŭkon!

Estas iu malgranda 90-jara sinjorino kiu iras al konfesejo kaj diras al la pastro:

- Senjoro preposto, mi pekis. Ĉu vi pensas ke Dio akceptos min en sian paradizon?
- Sed kion do vi faris por esti tiel maltrankvila?
- Dum la milito, mi ŝirmis iun judon en mia kelo.
- Sed estas mirinda - diras la pastro - kia belega faro!
- Jes sed - ŝi diras - mi monate petis al li 600 Eŭrojn!
- Jes sed tamen - diras la pastro - vi evitis al li senduban morton, Dio certe akceptos kaj pardonos vin.
- Tamen mi timas - diras la maljunulino.
- Sed finfine, kial do?
- Mi ne ankoraŭ diris al li ke la milito estis finita!!!

- Saluton mia koro, estas paĉjo je la telefono... Ĉu vi povas transdoni panjon al mi?

- Mi ne povas, ŝi estas en ŝia ĉambro ĉi supren kun onklo Davido.

Nelonga silento.

- Sed mia karulino, vi ne havas onklon Davidon.

- Jes, jes, li estas en la ĉambro kun panjo!

- Nu ja, bone, do, jen tio kion mi volas ke vi faru: demetu la telefonon, kuru supren, frapu la ĉambropordon, kaj krii al panjo kaj al onklo Davido ke la veturilo de paĉjo ĵus reeniris en la aŭtejon...

- Konsentante paĉjo...

Kelkajn sekundojn pli malfrue, la knabineto, panikanta kaj larme, revenas al telefonon.

- Mi faris tion kion vi diris, paĉjo.

- Do, kio okazis?

- Nu, panjo ekkriis, elsaltis el la lito tute nuda, ŝi ekkuris ĉien, ŝi glitis sur la tapiŝo, ŝi falis sur la litangulon.

Estis plenplne da sango kaj ŝi ne plu movas, mi kredas ke ŝi estas morta!

- Ho Dio mia! Dio mia! Dio mia!... Kaj onklo Davido?

- Nu, li elsaltis el la lito tute nuda, ekkuris ĉien, poste li saltis tra la malantaŭa fenestro en la naĝejon...

Sed li forgesis ke la pasinta semajnfino, vi malplenigis la naĝejon por purigi ĝin, kaj nun mi pensas ke li estas morta, ankaŭ li...

Longa silento. Poste paĉjo diras:

- La naĝejo? kiu naĝejo? Ĉu vi ne estas Maria? Ĉu mi ne estas ĉe 0474 987 654?

Iu viro unuafoje ludas golfon sur efektive malsimpla grundo. Je iu momento, li konfuziĝas kaj ne plu estas certa pri la ĝusta loko kie li troviĝas en la vojiro.

Ĉirkaŭrigardante, li ekvidas virinon kiu ludas antaŭ li. Li proksimiĝas, ekskuziĝas, klarigas al ŝi sian konfuzon kaj demandas al ŝi ĉu ŝi

scias ĉe kiu truo li ludas. Ŝi respondas : "Nu, mi estas ĉe la sepa kaj vi estas unu truon malantaŭ mi, do vi devas esti ĉe la sesa". La viro dankas ŝin kaj daŭrigas sian partion.

Iom pli poste, la sama situacio okazas. Li ankoraŭfoje proksimiĝas la virinon kaj metas al ŝi la saman demandon. Ŝi rediras : "Mi nun estas ĉe la 14a truo kaj vi estas unu truon malantaŭ mi. Vi do devas esti ĉe la 13a". La viro denove dankas ŝin kaj finas sian partion.

Kiam li eniras en la klubdomon, li ekvidas la virinon sidanta ĉe la verŝotablo. Li demandas al kelnero ĉu li konas ŝin. Li jese respondas : "Ŝi estas reprezentantino kaj regule venas ludi en tiu klubo".

Nia golfinto aliras al ŝi kaj proponas al ŝi glason por danki ŝin. "Laŭ mia kompreno, vi estas reprezentantino. Mi ankaŭ estas en la vendado. Kion vi vendas ?"

- Se mi diras tion al vi, promesu al mi ne ridi...

- Konsentite - respondas la viro.

- Nu do - ŝi iom ĝenata pluigas - mi laboras ĉe Tampaks-o.

Tuj, la viro laŭte ekridegas.

- Mi sciis ke vi mokridos min; ĉiufoje kiam mi diras kion mi vendas, tia estas la reago kiun ĝi vekas.

- Ne, ne, la viro respondas viŝinte siajn larmojn, mi ne mokas pri via laboro ! Mi laboras ĉe Lotus kaj vendas necesejan paperon, do ankaŭ profesie mi estas unu truon malantaŭ vi !

Jen fabelo kiu rememorigas al ni iun veron tiel necesegan kiel vivgravan. Ni fojfoje vekas nigrajn pensojn kaj tiam la vivo ŝajnas al ni tre malgaja. En tiuj momentoj, estas tre utile rememori ke la vivo ne estas aĉa. Nur niaj pensoj povas esti aĉaj. La vivo

estas la vivo, amo apartenas al ĝi tiel kiel malsano aŭ morto, iu florkampo tiel kiel iu industrizono. Dependas nur de ni senti nin bone ĉiam tie kie ni estas. Do kiel estas homoj ?

Sidis iam maljunulo ĉe la eniro de iu Mezorianta urbo. Iu junulo proksimiĝas kaj diris al li :

- Mi neniam venis ĉi tie ; kiel estas homoj kiuj vivas en tiu urbo ?

La maljunulo respondis al li per demando :

- Kiel estis homoj en la urbo el kiu vi venas ?

- Egoistaj kaj malafablaj. Cetere estas pro tio ke mi estis tre kontenta foriri - diras la junulo.

La maljunulo respondis :

- Vi trovos samajn homojn ĉi tie.

Iom pli malfrue, alia junulo ekproksimiĝas kaj metis ekzakte la saman demandon.

- Mi ĵus alvenis en la regiono ; kiel estas homoj kiuj vivas en tiu urbo ?

La maljunulo same respondis :

- Diru al mi, mia knabo, kiel estis homoj en la urbo el kiu vi venas ?

- Ili estis bonaj kaj gastamaj, honestaj; tien, mi havis bonajn amikojn, mi suferis pro forlasi ĝin - respondis la junulo.

- Vi trovos la samajn ĉi tie - respondis la maljunulo.

Iu vendisto kiu trinkigis siajn kamelojn ne for de tien, aŭdis la du interparoladojn. Tuj kiam la dua junulo estis malproksima, li alparolis al maljunulo per riproĉa tono :

- Kiel vi povas doni du respondojn tute malsamajn pri la sama demando metita de du personoj ?

- Mi respondis egale. Tiu kiu malfermas sian koron ankaŭ ŝanĝas sian vidmanieron pri la aliaj - respondis la maljunulo. - Ĉiu portas sian universon en sia koro.

SinJORINO kun fileto sesjaraĝa manĝas en restoracio. Malatente la infano

metas moneron en la buŝo, glutas ĝin kaj sufokas. Patrino klopodas forĵetigi la monero frapante la infanon sur la dorso, fingrante lian kolon, lin skuante, agitante, svingigante, tremetigante, sensukcese. La infano jam paliĝas kaj eksvenas, la patrino frezeziĝanta krias helpon.

Iu sinjoro sidante apud najbara tablo, ekstaras, alproksimiĝas malrapide kaj mirinde trankvile kaj silente malsuprenirigas la pantalonon de la knabeto, prenas kaj premas fortege liajn malgrandajn testikulojn, tiras malsupren fortege unu nuran fojon. Tuj la knabo, pro la neeltenebla momenta dolorego kraĉas la moneron, la sinjoro daŭre malrapide kaj mirinde trankvile kaj silente reiras al sia seĝo.

Post iom da tempo, la sinJORINO jam trankviligita, alproksimiĝas la sinJORON por danki pro savo de la vivo de ŝia infano kaj demandas :

- Vi estas certe medicisto, ĉu ne?

-Tute ne, sinJORINO, mi estas funkciulo de la impostoj, spertulo pri premi la kontribuantoj ĝis preno de la lasta monero.

Du Belgoj iras serĉi benzenon en malproksima stacio ĉe la franca-belga limo, kiu alogas ilin tra partopreno en konkurso aranĝita de la staciotenisto : "Unu horo da seksumado senpage"!

Ili do plenigas sian benzinujon kaj demandas al la tenisto ĉu ili povas partopreni konkurson.

- Bone, diras la tenisto, se vi gajnas, vi rajtos unu horon da senpage seksumado, oferdonita de la komercejo.

- Kaj kiamaniere ni ludas ? - demandas la Belgoj.

- Estas facila - diras la tenisto - mi estas pensanta iun nombron inter 1 kaj 9. Se vi divenas tiun nombron, vi gajnas vian horon da senpage seksumado.

- Mi diras 7 - unua Belgo rŝpondas. - Mi bedaŭras, estis 8 - diras la tenisto. La sekvanta semajno, ili reiras al la stacio, replenigas la benzinujon kaj demandas partopreni la konkurson.

- Konsentite - diras la tenisto, mi estas pensanta iun nombron inter 1 kaj 9, se vi divenas tiun nombron, vi gajnas vian horon da senpage seksumado.

- Mi diras 5 - respondas unua Belgo. - Mi bedaŭras, estis 6 - diras la tenisto. Revenante hejmen, la unua Belgo diras al la alia :

- Mi supozas ke tiu konkurso estas falsita.

- Mi kredas ke ne estas falsita - respondas la dua - ĉar pasintsemajne mia edzino dufoje gajnis !!!

Lucien Michaux, belgo, serĉis, elektis kaj tradukis

Semajno de Internacia Amikeco
Belga SIA-festo - temo: Esperanto & Interneta
Leuven - sabato 25.02.2012

10u	arkunveno FEL
12u	viena bufedo
13-30u	prelegoj, loka strategio, kvizoj, vortludoj
2x	gvidata promeno en Leuven
17:30u	bulkoj, agrabia kunestado

CC Romaanse Poort, Brusselssestraat 63, Leuven
10u-20u horo senpage programo

www.esperanto3000.be - 0486/39.28.02

SEVILA JUBILEO

En la belega urbo Sevilo la 21-23-an de oktobro 2011 okazis la 16a Andaluzia Esperanto-Kongreso, dediĉita al la festado de la centjariĝo de Esperanto en Sevilo. Pli ol 50 homoj aliĝis al la kongreso.

Nia kara samideanino Rafaela Urueña, emerita profesorino pri internacia juro, prelegis pri "La graveco de la protektado de la medio"; ŝi, kiel kutime, parolis klare kaj saĝe pri la grava nuntempa temo kaj klarigis al ni la problemojn de la medio kaj eblajn solvojn.

Antonio Rodríguez Gash, klimatologo, laborulo de Andaluzia Televido, prelegis detale pri Sevila Esperanto-Asocio (SEA) kaj ĝia centjara historio.



Rafael Mateos el Onubo, emerita lingvoinstruisto kaj tre agema esperantisto, kiu dum la lastaj ses jaroj instruis Esperanton en la publika biblioteko de Onubo, poste en la kastelo Greziljono, Hungario, Ukrainio kaj Ĉinio, parolis pri *La lingva instinkto* de Steven Pinker.

La voĉtradukisto Jorge Camacho, kiu dum dek jaroj membris en la Akademio de Esperanto kaj tradukis kaj verkis kelkajn librojn kaj kiu nuntempe kunredaktas *Beletran Almanakon*, prelegis kaj gvidis kun granda sukceso, tre interesan atelieron pri “Kiel poemi kaj deklami poezion”. José María Rodríguez Hernández, juristo, redaktoro de *Gazeto Andaluzia* kaj *Internacia Juro* kaj sekretario de AEU, prelegis pri la historio de Andaluzia Esperanto-Uniĝo. Li estas kunfondinto de ĉi asocio en 1983 kaj sindonema esperantisto, kies valoron agnoskis la membroj de AEU kaj ĉi-jare oni decidis premii lin per memor-tabulo, kiun li ricevis dum la kongresa bankedo.

Kompreneble, en ĉiuj kongresoj oni ĝuas ekskursojn aŭ longajn promenadojn, kaj la urbo Sevilo estas loko por longe promeni, ĉefe tra la

juda kaj mezepoka kvartaloj. Antonio Rodríguez Gash, Sevila spertulo pri la urbo, gvidis la grupon tra mallarĝaj sed belegaj stratoj rakontante detale pri eventoj kaj artaj konstruaĵoj.



En Sevilo inter aliaj nombraj monumentoj kaj konstruaĵoj staras la dua pli granda gotika katedralo en la mondo La Giralda kaj la dua plej grava artmuzeo en Hispanio kun verkoj de Murillo, Velázquez, El Greco. Ni ĝuis belan filmon en esperanto, filmitan en la Madrida Liceo de Esperanto en 1980, kaj projekciadon de fotoj pri la historio de Esperanto en la urbo, fotoj aperontaj en la libro *Cent jaroj da Esperanto en Sevilo*, kies aŭtoroj estas Antonio Rodríguez Gash kaj Juan de Dios Montoto.

Sevila Esperanto Asocio regalis la ĉeestantojn per bongusta fritita fiŝo en alloga restoracio apud la rivero Gvadalkiviro, la deserto konsistis el bongusta torto desegnita per esperantaj motivoj, kaj por fini la feston, ni tostis per *Cava Esperanto*,

speciala trinkaĵo produktita en Katalunio.

Dimanĉe ni ĝuis bongustan ĉokoladon kun tipaj kukoj en la alloga kaj tipa Flamenka Rondo “Pies Plomo”, kie ni daŭrigis la kongreson per prelegoj kaj amuzaj babiladoj. La ĉefa temo estis AJEU, juna grupo de Andaluzio kaj anekdotoj pri la historio de Esperanto en Sevilo. La kulmino de ĉi mirindega kongreso estis koncerto en la monahinejo Santa Rosalía, kie dum pli ol unu horo ni ĝuis belegan muzikon kaj fine ni aŭdis la Esperantan himnon *La Espero*.

Poste kelkaj grupetoj sub suna ĉielo faris la lastan promenadon kaj tagmanĝis en diversaj restoracioj de la urbo. La venonta Andaluzia kongreso okazos en la historia urbo Ronda, kaj jam ni laboras por okazigi fruktodonan kongreson.

Angel Arquillos López, Prezidanto de AEU
La Baila Ondo <http://sezonoj.ru/2011/11/aek/>
La Ondo de Esperanto, 2011, №12 (206)

INTERNACIA E-SEMAJNO

Pri la 19-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Malgrat de Mar, apud Barcelono, de la 1-a ĝis la 8-a de oktobro 2011.

La tradicia E-Semajno okazas ĉiujare aŭtune en Hispanio. Katalunaj esperantistoj aranĝas ĝin. Ni restadis en la hotelo “Cartago Nova”, kie renkontiĝis 130 esperantistoj. Amase venis hispanoj, francoj kaj belgoj. Entute venis personoj el 12 naciecoj, inter kiuj pluraj novuloj. La vetero tiutempe estas varma, do tiele oni plilongigas la someron kaj ĝuas agrablan restadon inter geamikoj. Malgrat de Mar situas proksimume 60 km nordoriente de Barcelono. Ĝi estas ĉefe turisma urbo, havanta ĉirkaŭ 20 000 enloĝantojn, kiuj dum somero

trioblighas pro alveno de turistoj. Dum la vintro multaj hoteloj ne funkcias.



Kunaj flugantoj Bruselo-Barcelono

La Semajno komenciĝis sabate la 1-an de oktobro. Dimanĉe okazis malfermo kun ĉeesto de la reprezentantino de kulturo kaj la urbestriko de Margrat de Mar s-ino Conxita Campoy i Martí. Post la parolado de la ĉefa organizanto Luis Serrano Peréz ŝi bonvenigis nin kaj esprimis favoran sintenon al Esperanto. Danke ŝi ricevis memoraĵon pri nia aranĝo kaj plurajn librojn, inter kiuj la fama “Don Kihoto”. De la urbo ĉiuj ricevis ĉapelon kaj dorsosaketon, kiujn ni utiligis ĉefe dum la ekskursoj. Komuna fotado okazis antaŭ la hotelo, sur kies barilo pendis banderolo anoncanta nian aranĝon. Do, ĉiuj preterpasantoj eksciis pri ekzisto de Esperanto. Tiutempe ankoraŭ estis amaso da turistoj, kiuj ĝuis belan sezonon ĉe la marbordo. Dum la semajno okazis pluraj allogaj prelegoj, debatoj, diskutoj.

Liberan tempon iuj profitis piedpromenante aŭ per turisma trajneto, aliaj naĝis en la hotela naĝejo aŭ en la maro. E-kurson gvidis Stano Marček. Li prezentis al interesitoj sian vastan pedagogian

materialon kaj poste instruis laŭ ĝi. La du interkonaj vesperoj okazis en gaja etoso. Oni trinkis Esperanto-ĉampanon, spertuloj dolĉan vinon el specialaj ujoj nomataj “bota” kaj “porron”. Ne mankis frandaĵoj. Ĉiuj bone amuziĝis kaj babilis.

Per bildoj ni havis okazon konatiĝi kun Rumanio kaj Laoso. Pri Rumanio rakontis Rodica Todor (vestita en bela nacia kostumo), kiu loĝas en Braŝovo. Pri Laoso donis informojn Rémy Bouchet el Francio. Li konatiĝis kun la lando dum sia vojaĝo. La geedzoj el Belgio Michéle kaj Hubert rakontis pri sia sperto vojaĝante al la 90-a UK en Vilno. Ili ankaŭ montris interesajn bildojn pri la naturo kaj pri renkontoj kun esperantistoj. José Año Belda organizis kaj prizorgis intervjuon de radio al kelkaj partoprenantoj. La intervjuo estis rekte disaŭdigita, ĝi okazis telefone.

Serio da prelegoj temis pri: “La arto de la branĉo-tondado”, “La giganta laboro de Monda Asembleo Socia” (MAS), “Kiel nomas la sciencistoj la vivaĵojn?”, “La belga kompromiso”, “E-civito kaj la E-kulturo”. En tiu-ĉi aranĝo estas kutimo atribui premion al elstara esperantisto. Ĉi-foje ĝi estis aljuĝita al franciĝinta hungaro Eugène Zilah. Vigla debato ekestis pri la demando “Ĉu Esperanto estas artefarita lingvo?” Por ŝatantoj de opero Maria Ferigle prezentis sur DVD operon “Turandot”.

Okazis du duontagaj ekskursoj. Ni vizitis la urbon Viladrau kaj ties akvomuzeon. Dum la dua ekskurso traveturante la urbon Caldes de Malavella ni vidis hotelrestadejon “Vichy” kun varmoterapio. En apuda fabriko oni enboteligas mineralan akvon. En la entrepreno de biskvitoj

Trias, kiu troviĝas en la urbo Sta. Coloma de Farnés ni trarigardis muzeon, spektis filmon pri la historia evoluo de la fabrikado kaj pri ĝiaj posedantoj. Fine ni gustumis tri specojn da biskvitoj. Nerezistebla estis aĉetado. La urbo Sabadell estis la celo de la tuttaga ekskurso. Unue ni vizitis Paleontologian muzeon. Malantaŭ la pordo de la enirejo atendis nin fantazia prahomo en Adam-vesto (sen la folio), kiu ŝokis kelkajn, sed aliaj atente observis lin. Ni konatiĝis kun la paleontologia esplorado ekde la eltrovo, studado kaj publikado. Ni vidis plurajn fosiliajn eltrovaĵojn kaj laboratorion, kie oni preparis ilin. Poste ni piedmarŝis tra la strato Zamenhof ĝis la monumento de Zamenhof, kien ni metis florbukedon kaj fotiĝis. Sekvis pikniko ĉe bela parko kaj vizito de la subĉiela artmuzeo en “Pedregar”.

En Malgrat okazis la 12-a Internacia festivalo de muzikbandoj. Jaŭde matene ni spektis ilian paradon tra la promenejo. Ili ekis de nia hotelo kaj poste koncertis en la urbocentro. Venis muzikantoj el Svislando, Italio, Pollando, Germanio, Nederlando kaj tri malsamaj bandoj el Ĉeĥio. Fine de la tago ni ĝuis la tradician folkloran vesperon kun la ensemblo “Els Rogels”. La muzikistoj regalis nin per bela havana muziko kaj kantoj, kiuj inspiris iujn al dancado. Al bona etoso kontribuis trinkado de jam ankaŭ tradicia bongusta specialaĵo “Cremat”-bruligita rumo kun spicaĵoj. Ĉiu ricevis memoraĵe ujeton, en kiun ĝi estis verŝita. Dum la lasta vespero oni pritraktis funkciadon de la E-Semajno kaj la sekvan tagon ĉiuj disiĝis al siaj hejmoj. Ni ĝojatendas la venontjaran renkonton por festi la 20-an jubileon.

Liba Gabalda

11

12

ĈU NI MORTU AŬ PPROSPERU?

Prof. Geremek, EU eksvicprezidanto, kaj eksa ministro, pri eksterlandaj aferoj de Pollando, asertis ke:

Unue: granda plimulto en Eŭropa Parlamento kontraŭas la anglan dominadon;

Due: ekzistas profunda manko de kono pri Esperanto;

Trie: Ekzistas fortaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto.

Se ni klare konigos la avantaĝojn de Esperanto, EU-anoj certe repensos pri lingva malegaleco. Aliflanke, UEA laŭ UK-partoprenantaro malkreskas draste ĉiujare. Alarmo pro reprints la tuton antaŭ ol ni mortu! Feliĉe UEA havas kelkaj milionoj da Eŭroj. Tio sufiĉas por samtage reklami en 27 landoj ĉiumonate dum unu jaro. Jen investo por la estonto! Granda kampanjo certe vekos EU-anojn.



Miyoshi kun la redaktisto kaj Kozyra kaj Dobrzynski en la UK de Roterdamo

Mezeŭropanoj devige lernadis la rusan kaj nun la anglan. Ĉu ni akceptu la ĉinan por niaj genepoj?

Mi proponis tion al la partoprenantoj de Venku Fejsbuke (VFBe) dum UK. Nun mi petas la Esperantistaron ekdiskuti pri tio. Se UEA akceptas kaj decidus investi en informado, ni havos enorman ŝancon aŭ restos nur mono. Ĉio sukcesa estas bazita en la elekto kaj koncentriĝo. Per ĵurnala reklamado la avantaĵoj de Esperanto, ĝi pli restas ĉe la koro de la legantoj ol per TV. Ni respektu la deziron kiu iu donacis por nia prospero. Konigi la testamenton de Geremek renversigos Eŭropon. Se ni ne reagos, Ludoviko ploros en la ĉielo.

Etsuo Miyoshi en "Pola Esperantisto" 5/2011

MALFERMA TAGO 26.11.2011

Malferma Tago: omaĝo al Sekelj, repremiero de historia filmo. La 35-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 26-an de novembro allogis 70 vizitantojn el 11 landoj. La ĉefan prelegon faris Spomenka Štimec pri la vivo de la mondvojaĝanto, ĵurnalisto, verkisto kaj movada aganto Tibor Sekelj (1912-1988). La 14-an de februaro pasos 100 jaroj de post lia naskiĝo, pro kio Eŭropa Esperanto-Unio deklaris la jaron 2012 Jaro de Tibor Sekelj kaj ankaŭ la Komitato de UEA rekomendis priatenti la datrevenon. La prelego de Štimec estis do kvazaŭ enkonduko al la jaro. Ĝi estis filmita kaj estos baldaŭ videbla en la Reta Kinejo de UEA.



Osmo Buller kun Spomenka Štimec

En sia alia kontribuo al la programo Spomenka Štimec, unu el la plej konataj nuntempaj Esperanto-aŭtoroj, parolis pri sia verkista agado. D-ro Ziko van Dijk, prezidanto de Wikimedia Nederland, parolis pri la libera reta enciklopedio Vikipedio. Krome, deko da interesitoj revenis al la Centra Oficejo en la posta tago por la seminario "Libera scio: kulturo de disdonado". Ili konatiĝis kun la filozofio malantaŭ Vikipedio kaj ricevis trejnadon ne nur pri ĝia uzado sed ankaŭ pri tio, kiel mem kontribui al ĝia enhavo. La seminarion gvidis Ziko van Dijk kaj la Vikipedia aktivulo Marek Blahuš. En la

programo estis ankaŭ du filmoj. La unua, "Vojaĝo al Marseille", estas 45-minuta dokumento produktita de Esperanto-Filmo Germanujo pri la partopreno de la germana esperantistino Injo en la Universala Kongreso en Marsejlo en 1957. Malgraŭ la titolo la filmo enhavas ankaŭ fragmenton pri la UK en Kopenhago en la antaŭa jaro. Biblioteko Hodler ricevis la filmon siatempe donace de Joachim Giessner, unu el ĝiaj aŭtoroj, kaj UEA ciferecigis ĝin lastatempe. Parte en UK-oj estis farita ankaŭ la alia montrita filmo, "The Universal Language" ("La Universala Lingvo"), de la usona reĝisoro Sam Green.

La Malferman Tagon finis tradicie la programero "Estraranoj respondas", dum kiu vicprezidanto Claude Nourmont, ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak kaj estrarano Loes Demmendaal respondis demandojn pri la aktuala agado de UEA. La libroservo estis bone vizitata kaj ĝiaj vendoj sumiĝis je 2176 eŭroj. Apud verkoj de Sekelj kaj Ŝtimec plej multe vendiĝis la tute nova disko "Amindaj" de la samnoma kuba muzikgrupo kaj la ĵus aperinta numero 12 de "Beletra Almanako".

La sekva Malferma Tago okazos sabaton, la 28-an de aprilo 2012 kaj estos dediĉata al la 50-jara funkciado de la Centra Oficejo en la domo ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, 436, 01.12.2011

POLOJ EN BRUSELO

Karaj Gesamideanoj, Hodiaŭ 26-11-2011, mi finfine ricevis preparitan prezentadon pri nia septembra ekskurso tra Eŭropo, kies grava celo estis viziti la Eŭropan

13
Parlamenton, kaj survoje trovi la eblecojn por la venonta kunlaboro.



Pro la tre malfrua konfirmo el la Parlamenta Buroo de Vizitoj, ni havis nur kelkaj tagoj por prepari ĉion - kontakti la partoprenantojn, aranĝi la programon, mendi transporton kaj la tre grave: rezervi tranoktadon dum la ekskursiva vojo... Helpis nin amikece vi ĉiuj - per la kontaktado, informado, mendoj, tial mi nune sendas al vi prezentadon de nia ekskurso, kun grandaj dankoj al vi ĉiuj kaj ankaŭ al nia gvidantino Ella, kies retadreso mi ne havas. Mi petas Agnes, por ke ŝi transdonu al Ella nian dankemon pro tre interesa, kompetenta kaj amikeca gvidado tra Antverpeno.



Al gesamideanoj el FEL dankoj pro la gastema akcepto en ilia Klubejo, al Paulo pro la koresponda helpo sed kun samtempa miro, ke la Brusela Grupo ne rimarkis - viziton de 27 gesamideanojn - aktivajn polajn

14
agantojn - por aldoni unufrazan informon pri la evento de 21-9-2011 en sia laŭ vica bulteno... Bedaŭrinde, ke ni eĉ ne havas fotojn el nia tie ĉeesto.



Ni memoros, ke Marcel Delforge aranĝis por ni hotelon antaŭ Bruselo. Multege da tempo donis al ni Henriko Wenzel el Berlino. Kiel ĉiam, trovis al ni la tempon Urbestro de Herzberg-Esperanto Urbo, sinjoro Gerhard Walter kun gvidantoj de ICH - Zsofia Korody kaj Peter Zillvar. Bela estas etoso en Esperantujo, kie oni povas ĉiam trovi, ekkoni la verajn amikojn. Vivu la Stel! Amike - Halina Komar el Pollando, nome de polaj ekskursanoj. 26-11-2011

MEMBROJ DUMVIVAJ DE ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

BRACKE	Clara
POTERUCHA	Barbara
SPERBER	Francine
DELLILE-MAES	Nicole
VAN DAMME	Emile
KOVACIC	Neven
LARUE	Bernard-Regis
RICCI - MORELLI	Guido
DECEUNINK	Herman
AMADORI	Jan



Katarzyna Kuske, Membro de EBG



Francine, Dumviva Membro de EBG

JARASSEMBLEO DE E. B. G.



La ĝenerala jarasembleo de nia Esperantista Brusela Grupo okazis kiel anoncita merkrede la 30an de Novembro. Michael Cwik estis ĉargita pri skribi la proponon de publikigota protokolo.



La plej grava decido, krom la aprobo de lastjara protokolo, de la raportoj de la kasisto kaj de la prezidanto, koncernis la nomiĝon de la nova estrarano kaj sekretario Laurent Loisse anstataŭante Muriel Petit kiu rezignis pro manko da tempo.

Paulo Branco, estrarano de EBG

BRUSELA ESPERANTO-CAFÉ



Esperanto-Café okazis denove en Bruselo, vendrede la 2an de Decembro vespere, ĉi-foje en "Espace Magh", agrabla loko en la daŭrigo de la strato de "Manneken Pis", strato Pinçon-Priem. La etoso estis multkolora kaj internacia kun ĉirkaŭ dudeko da partoprenantoj de diversaj urboj de Belgio kaj de diversaj eksteraj landoj. La estrarano de EBG Nicholas de Buyl, estis denove la respondeculo de la iniciato kiu estas okazanta averaĝe unu fojo po monato.

ZAM-FESTOJ EN BELGIO

Por festi la 15an de Decembro, tago de Zamenhof, La Hirundo, klubo de Tienen festas sabate la 10an vespere; La Konko, klubo de Oostende, festas dimanĉe la 11an ek de la finmateno; Antverpena Verda Stelo festas vendrede la 16an; nia E-Brusela Grupo festas sabate la 17an ek de la finmateno; kaj la klubo de Liège festas marde la 20an ek de la 17h30. Bondezirojn de bonaj festoj al ĉiuj!



Zam-festoj 2009 en Oostende kaj Tienen.



POEMARO

MI ESTAS EN VIA RIGARDO

Tie, en la nenio kiun viaj okuloj kreas, kiam ili estas fermitaj, mi, senpacience, restas ĉirkaŭita de pensoj letargiaj,

atendante la lumon de l'radiaj sunoj kiuj en via vido nestas. L'brilon de viaj pupiloj mi festas en la aŭroro de l'okulpasiaj.

En viaj stelokuloj, mia mio, Dissolviĝas en helradiaj amo, Sentante, ke transe de ĝi nenio

ekzistas, Vi ĉiam en la lumflamo estas; mi, volus per amharmonio, loĝadi ĉiam en via ĉiamo.

Alberto Garcia Orive, Bilbao

PRAGO SUB LA AKVO

Nun, de akvo kovrita, kuŝas, Prago. Kiu estis la plej belega floro ekzistanta en mia rememoro nuntmpe estas makulita lago.

Ho! ; antaŭ tiel danteska imago, estas tiel granda mia doloro, ke larmoj kaj pluvo, en mia koro miksiĝas, en ĉi terurega tago!.

El la nigra funebra firmamento falas al la moldova rivero pluvado, kiu fariĝas torento

puŝante ĉion kiu sur la tero staras. Prago ŝanĝiĝas en momento. Nun ĉio estas: plendoj kaj sufero!.

Alberto Garcia Orive, Bilbao

SEN ILUZIO

Sur la vitrluko de mia spirito sonis ŝtonetoj de amo-pasio; kiuj, faligis min al letargio de Morfeo, en revo-infinito.

Endormigis min la rulado-rito; kaj mi, intere sonĝoj de poezio, amo, muziko kaj revfantazio, estis feliĉa, en mia dormlito.

La belsono estis tiel ebria, ke mia sento, por mia fatalo, perdiĝis inter soniluzia

pensante, ke ĝi estus senmortalo. . . Ĝis, ke subite mi restis glacia. Mi vidis: estis rompita l'kristalo!

Alberto Garcia Orive, Oktobro 2011, Bilbao

LA NIGRA RAJDANTO

Ĉe l' vojo: fulga trab' de dom',
Post arb' rikanas ostfantom'.
En la plumbe peza noksilent'
Nur foje ĝemas branĉo pro vent'.
Kaj en droniga glua kot'
Jen kuras en freneza trot'
Ĉevalo nigra tra l' malhel',
Rajdanto nigra en la sel'.
Ĉe l' vojo: fulga trab' de dom',
Post arb' rikanas ostfantom'...

Sub kasko: vizaĝ' en morta pal',
En sango glitas huf' de ĉeval'.
"Rajdanto! Kien la rapid'?"
Respondas moke raŭka rid'.
"Rajdant'! La hejmo jam ruin'!
Rajdant'! Revokas vin patrin'!
Rajdant'! Postploras vin infan'!"
"Forblovas flokojn uragan'!"
"Sed kia cel', do kia cel'?"
Respond' ne venas el la sel'.
Klinita kap', freneza trot',
En drona, glua, sanga kot'
Glitadas hufo de ĉeval'...
Okuloj vitraj, morta pal'.

Kálmán Kalocsay(1892-1976),

VORTARA PAĜO KUN DESEĜNAĴOJ

Manĝaĵoj

matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo, ĉirkaŭaĵo

boligita ovo, rostila pano, marmelado, supo, omeleto, salato

kafo, fritita ovo, kremo, lakto, sukero, teo, tekrucio, cerealoj, trinkĉokolado, mielo, salo, pipro, hamburgero, kokajo, rizo, saŭco, spagetoj, terpomkaĉo, pico, terpomfritoj, deserto

Sportoj

remado, korbopilado, neĝtabulado, velado, veltabulado, ĉiokvado

DINA DELOYER



Membro de EBG - Esperantista Brusela Grupo